

LI VENIS AL KAFARNAUMO, POR KE PLENUMIĜU TIO, KION DIRIS DIO PER LA PROFETO JESAJA – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ *Mateo 4,12-23*

Aŭdinte, ke Johano estas arestita, Jesuo foriris en Galileon; kaj lasinte Nazareton, li iris al la apudmara Kafarnaumo, ĉe la limoj de Zebulun kaj Naftali. Tiel plenumiĝis tio, kion diris Dio per la profeto Jesaja:

“En la lando de Zebulun kaj Naftali apud la maro, trans Jordano, en la Galileo loĝata de idolanoj, via popolo, kiu vivas en mallumo, vidos grandan lumon. Super loĝantoj en la mallumo, ekbrilos granda lumo.” De tiam Jesuo komencis prediki sian mesaĝon: “Pentu, ĉar la regno de la ĉielo alproksimiĝas.”

Iam, irante apud la maro de Galileo, Jesuo vidis du fratojn, Simonon, kiu poste estos nomata Petro, kaj Andreon, ĵetantajn reton en la maron, ĉar ili estis fiŝkaptistoj. Li diris al ili: “Sekvu Min, ĉar Mi faros vin kaptistoj de homoj.” Kaj ili, tuj forlasinte la retojn, sekvis Lin. Pluirante, Li vidis du aliajn fratojn: ili estis Jakobo, filo de Zebedeo, kaj Johano, kiuj en ŝipeto kun sia patro Zebedeo, estis riparantaj siajn retojn. Jesuo vokis ankaŭ ilin. Kaj ili tuj forlasis la ŝipeton kaj sian patron, kaj sekvis Lin.

Jesuo trairis la tutan Galileon, instruante en la sinagogoj, predikante la Evangelion pri la regno kaj resanigante ĉiujn malsanojn kaj malfortajojn inter la popolo.

Evangeliiŝto Mateo prezentas en tiu ĉi peco la komencon de la agado de Jesuo. Post kiam li eksciis ke Johano estas areŝtita kaj do la medio iĝas ŝtreĉa kaj malfacila en Judujo, Jesuo iras norden, en Galileon, en la regiono kiun ni vidas ŝufiĉe malŝatata, *"kaj lasinte Nazareton, li iris al Kafarnaumo"*. Estas interesa la fakto ke kaj Nazaret kaj Kafarnaumo estas neniam citataj en la Antikva testamento, ĉiukaze Kafarnaumo estas limurbo, grava doganejo.

La evangeliiŝto skribas poste *"apudmara"*, sed reale temas pri lago. Kial la evangeliiŝto parolas pri maro? Ĉar per tiu artifiko, anŝtataŭigante lagon per maro, la evangeliiŝto celas doni teologian indikon; la maro estas tiu kiu dividis Izraelon disde la paganoj, sed precipe la maro estis tiu kiun la popolo de Izraelo estis transirinta por fuĝi de la egipta sklaveco. Ĝi do indikis la plenan liberigon. La tuta temaro de la evangeliiŝto baziĝas sur la fadenlinio Eliro kaj Jesuo estas la nova Moseo kiu venas por liberigi sian popolon.

Kaj ĉi tie la evangeliiŝto vidas, en la agado de Jesuo, en la decido de Jesuo norden-iri al Galileo, la realigon de la mesia promeso je liberigo de iu ŝubprema ŝituacio al iu ŝaviga, de iu teritorio kiu estis dezertigiita de la Asirianoj kaj li citas profeton Jesajan je ĉapitro 8, versiklo 23, kie oni parolas pri la Galileo de la nacioj. Dum Judujo ŝuldas sian nomon al Judaso, unu el la plej gravaj patriarkoj, tiu norda regiono estis tiom malŝatata – ĝi estis regiono loĝata de malriĉuloj, kampuloj, de perfortuloj – tiom naŭzita la loĝantaro de Judujo pri tiuj de la nordo, ke Jesaja mem ne ŝcias kiel difini tiun regionon kaj utiligas maleŝtiman vorton, ĝin difinas *"la provinco aŭ la distrikto de la ne-hebreoj"*.

Distrikto en la hebrea estas Gelil, de kie la vorto Galileo, do dum Judujo venas de Judaso, Galileo venas de tiu maleŝtita vorto per kiu la profeto indikas tiun nordan regionon. Nu, ĝuste tiu norda maleŝtimata regiono, kie la popolo loĝas en la mallumo, ĝuste tie ekvenis la lumo. Kaj ĉi tie la evangeliiŝto antaŭigas tion kio poste estos la agado de Jesuo, lumo de la mondo, komuniki al siaj diŝiploj mem la eblecon esti la lumo de la mondo.

Kaj Jesuo komencas sian agadon *"De tiam Jesuo komencis prediki sian mesaĝon: "Pentu..."* La verbo 'penti' en la greka teksto de la evangelioj troviĝas dumaniere, unu kiu indikas religian revenon al Dio, la alia, kiu estas tiu utiligata de la evangeliiŝto, ŝignifas ŝanĝon de pensmaniero kiu efikas sur

la konduton. La evangeliistoj, Mateo aparte, evitas la unuan terminon, tiun kiu indikas la religian revenon al Dio.

Kun Jesuo, la Dio kun ni, oni ne plu devas reiri al Dio, sed akcepti tiun kaj kun li kaj kiel li iri al la aliaj, pro kio la pentado signifas direkti alimaniere propran ekziston. Se ĝis nun oni vivadis por si mem, ekde nun oni vivas por la aliaj. Tiu pentado alcelas la fakton ke *"la regno de la ĉielo alproksimiĝas"*.

Ĝi ne estas ankoraŭ realo, ĉar la regno de la ĉielo realiĝos per la akcepto de la beatecoj. La unua beateco permesos la realigon de la regno de la ĉielo. Sed kion oni celas per 'regno de la ĉielo'? Jesuo ne parolas pri regno en la ĉielo, tio estas la transmondo. Regno de la ĉielo, esprimo kiun ni trovas nur en la evangelio de Mateo, celas la regnon de Dio. Mateo, kiu verkas por iu hebrea komunumo, evitas utiligi la vorton 'Dio' ĉiam kiam tio eblas, por ne ofendi la sentemon de liaj legantoj kaj, kiam tio eblas, li utiligas evitvortojn.

Unu el tiuj estis 'ĉielo', regno de la ĉielo do ne signifas la transmondon, sed la regnon de Dio, tio estas Dio kiu iĝas reĝo de la popolo, oni permesas al Dio regi sian popolon. La pentado, la ŝanĝo de propra ekzisto, estas por permesi tiun realigon de la regno, kiu iĝos reala per la akcepto de la unua beateco.

La regno de la ĉielo, la regno de Dio, ne falas de la supra sed postulas la kunlaboron de la homo. Nu, *"irante apud la maro"*, refoje venas tiu vorto maro, la evangeliisto skribas ke Jesuo vidas Simonon kaj Andreon. Tiuj du rolantoj havas grekajn nomojn, tio signifas do ke ili devenas de familio sufiĉe malfermita. Simono aparte estas konata pro sia obstino, fakte li havas kromnomon 'ŝtono' kiu signifas lian obstinon, lian durecon, kiun oni poste malkovros laŭlonge de la tuta evangelio.

"Ili ĵetadis reton en la maron, ĉar ili estis fiŝkaptistoj". La aludo de la evangelisto estas al profetaĵo entenata en la libro de Ezekielo, ĉapitro 47, versiklo 10, kie *"la tempo de la mesio estos tempo de abundo da fiŝkaptistoj"*. Nu "Jesuo diris al ili: "Sekvu Min". Interese, Jesuo por komenci sian komunumon, la grupon kun kiu inaŭguri tiun regnon de Dio, ne iras serĉi monakojn – estis la esenoj – ne alvokas la piulojn, la fariseojn, tiujn kiuj estis sadukeoj, nek des malpli la teologojn, la skribistojn, sed li alvokas normalajn homojn, fiŝkaptistojn.

Li diras, *"Mi faros vin kaptistoj de homoj"*. Estas interese ke tiu titolo, la misio al kiu Jesuo alvokas la siajn estos poste tre rapide forlasita de la

eklezio. Ili preferos nomi sin paŝtistoj, titolo kiun Jesuo donis al neniuj personoj – li estas la ununura paŝtisto – anstataŭ kaptistoj de homoj, kiu estas tio kion Jesuo petas al la siaj fari.

Kion signifas kaptistoj de homoj? Dum kapti fiŝon signifas eltiri la fiŝon de sia natura medio por doni al li morton, kapti la homojn signifas ilin eltiri de la akvo, simbolo de la malbono, simbolo de la morto, por ilin savi, por doni al ili vivon. La propono de Jesuo do estas postsekvi lin por komuniki vivon al la tuta homaro.

“Kaj ili, tuj forlasinte la retojn, sekvis Lin.”. Poste estas la alvoko de aliaj du fratoj, Jakobo kaj Johano, tiuj havas judajn nomojn, hebreajn nomojn, kaj oni vidas poste en la daŭro de la evangelio ilian konduton kiu respegulas ilian nomon kaj ĉi tie substrekas la evangeliisto estas la ĉeesto de la patro, Zebedeo. Jesuo ilin vokas: *“Kaj ili tuj forlasis la ŝipeton kaj sian patron kaj sekvis lin”*.

Por sekvi Jesuon oni devas forlasi la patron. La patro reprezentas la aŭtoritaton kaj por sekvi Jesuon oni devas forlasi la patron, ĉar la ununura Patro kiu estas ene de la komunumo de kredantoj estas la Patro kiu estas en la ĉielo, kiu ne regas la homojn promulgante leĝojn kiujn tiuj devas respekti, sed komunikante al ili sian saman amkapablon.

“Jesuo trairis la tutan Galileon, ” tiu malestimata regiono do, *“instruante en la sinagogoj, predikante la Evangelion pri la regno”*. La evangeliisto utiligas du malsamajn verbojn por la agado de Jesuo. En la sinagogoj li instruas, kaj instrui signifas preni de la riĉeco de la Malnova Testamento por poste ĝin proponi. Do en la sinagogoj Jesuo prenas tion kio estas la riĉeco de la popolo, entenata en la Malnova Testamento, kaj ĝin proponas al ili.

Sed, por anonci la bonan novaĵon de la Regno, Jesuo ne instruas, sed anoncas aŭ predikas. Do estas du malsamaj verboj. Kiam sin adresas al la hebreaj Jesuo instruas, kiam sin adresas al personoj duonkredantaj aŭ eksterleĝaj, ne hebreaj, Jesuo anoncas aŭ predikas. Kaj tio signifas kapti la novon sen bezono iri kapti la antikvon.

Kaj, por la unua fojo en tiu ĉi evangelio, aperas la vorto ‘evangelio’ kiu signifas ‘bona novaĵo’. Kaj kiu estas la bona novaĵo? La bona novaĵo estas tiu de la Regno. Kaj fakte Jesuo ne nur parolas, sed agadas. Kiel? *“resanigante ĉiujn malsanojn kaj malfortaĵojn inter la popolo”*. Rimarku ke ne estas ‘de la popolo’ sed ‘inter la popolo’, tio estas Jesuo liberigas de tiuj

malhelpoj kiuj baras la akcepton de lia mesaĝo de vivpleneco en la popolo, kaj do komencas tiel disverŝiĝi la agado de Jesuo kaj komenciĝas la nova, nehaltigebla eliro.